

Geografia nomenklatur, 6-a parto
La landnoma demando laŭ Gaston Waringhien, 4-a parto
Claude Gacond, 287-a radioprelego, 1969.04.09 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia fundamenta nomenklatur.

Ĉerpante el la verko *Lingvo kaj Vivo* de Gaston Waringhien, ni provis raporti pri la esperanta kaj internacia aspektoj de la landnoma demando. Hodiaŭ ni ĉerpos el la ĉapitro titolita *La politika aspekto* de la landnoma demando.

Cl.- « *La landnomoj ne estas pure esperantaj apartenaĵoj : ili esence apartenas al la ŝtata potenco, kiu suverene decidas pri la maniero, kiel ĝi volas esti nomata.*

A.- Kiam en 1921 la angla registaro, el la mandatlando Mezopotamio, kreis la reĝlandon Irako ; kiam en 1922 la Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj difinis la aŭtonomajn respublikojn Ukraino, Bjelorusio, Georgio, Azerbajĝano kaj tiel plu : kiam en 1935 la persa registaro dekretis, ke la lando estos nomata Irano ; kiam en 1938 la libera irlanda registaro dekretis, ke la regno reprenos la malnovan nomon Ebro ; kiam en 1944 tri eŭropaj regnoj decidis unuiĝi ekonomike sub la nomo Benelukso ; kiam en 1947 la Imperio de Hindlandoj apartiĝis en tri dominiojn : Hindustano, Pakistano kaj Cejlono ; kiam en 1957 la angla kolonio la Ora Bordo fariĝis sendependa ŝtato sub la nomo Ghanao – ĉiufoje la ceteraj regnoj rajtis nur registri tiujn novajn nomojn, kaj la decidintoj petis permeson de nenia akademio en la mondo, eĉ ne de la esperantista.

Cl.- *Kaj ĉiuj tiuj novaj nomoj prezentas sin kiel landnomojn, de kiuj oni devas derivi per sufikso la nomon de la loĝantoj. »*

A.- Waringhien montras, ke tio ne estas hazardo. « *En la naciaj lingvoj la loĝantoj de la plej malnovaj regnoj de Okcidenta Eŭropo estas nomataj per sufikso : Englisch, Anglais, Engländer, Anglijskij...*

Cl.- *Spaniard, Espagnol, Spanier, Ispanjec...*

A.- *Italian, Italien, Italiener, Italijanjec...* »

Cl.- Waringhien konstatas, ke « *bedaŭrinde la sufikso **uj** kun sia konkreta kromsignifo de entenilo, estas ligita kun ideologio de gento kaj eĉ de raso. **Francujo** propre signifas **ujo por Francoj**, kio profunde ŝokas la komunan saĝon.*

A.- *Tio tre bone komprenigas, kial la membroj de Sennacieca Asocio Tutmonda principe rifuzas uzi la sufikson **uj** por la landnomoj. »*

Cl.- En sia analizo pri la landnoma demandon Waringhien alvenas al la sekvantaj konkludoj :

A.- Unue : « *Ne estas eble trovi unu regulon por la formado de ĉiuj landnomoj.- Sufiĉus citi, interne de la zamenhofa sistemo, la tri landojn, kiuj formas Benelukson, por trovi tri diversajn nommanierojn : Belgujo, Luksemburgio, Nederlando. »*

Cl.- Due : « *Ne estas eble kondamni absolute unu el la du partioj.- La **ujo**-anoj pravas, dirante, ke la alprenado de **io** enkondukus ŝanĝon en la **Fundamento**, ke ne estas la rolo de la akademio iniciati tian ŝanĝon, kaj ke la neta voĉdono de la Lingva Komitato havas leĝan valoron por la komuna uzo.*

A.- *La **io**-anoj pravas, dirante, ke la alprenado de **io** estus unu el la **aldonoj**, kiujn precize antaŭvidis la **Antaŭparolo** al la **Fundamento**, kaj ke la voĉdono signifas nur, ke la Lingva Komitato opiniis en 1922 la sufikson **io** ne sufiĉe vaste uzata por meriti oficialiĝon.*

Geografia nomenklature, 6-a parto
La landnoma demando laŭ Gaston Waringhien, 4-a parto
Claude Gacond, 287-a radioprelego, 1969.04.09 & 12

Cl.- *La unuaj akcentas la bezonon de konservativa tradiciemo, la duaj la neceson de evoluebleco, kaj ambaŭ plene pravas, ĉar tiuj ambaŭ fortoj normale kontribuas al la bonfarto de lingvo.*

A.- *En tia situacio, la lingvisto povas nur registri la variojn de la uzado. Estas evidente, ke ekde 1921 la grupo de la **io**-anoj, primitive kolektitaj ĉirkaŭ Hodler kaj Privat, iom post iom disvastiĝis, kaj nun rekrutiĝas en la vicoj de SAT, en sciencaj kaj teknikaj rondoj. [...]*

Cl.- *Aliflanke, ŝajnas, ke la ĝenerala sinteno de la gazetaro estas pli favora al **ujo**, dum la universalaj kongresoj liveras multajn okazojn aŭdi formojn kiel **Francano, Anglano...** »*

A.- Trie : « Ne estas eble malkonfesi la ekziston de la sufikso **io**. Se la konservativuloj ne povas akcepti ĝin por la formado de la eŭropaj landoj, ili tamen devas agnoski, ke ĝi estas oportuna por formi landnomon el la nomo de ĉefurbo : Alĝerio el la urbo Alĝero, el la nomo de rivero : Senegalio el la rivero Senegalo. »

Cl.- Kvare : « Restas tamen la postuloj de la internacia komprenebleco. Franca poŝtisto estos nekapabla rekonigi en **Danujo**, kiun li prononcos proksimume **danijo** la ĉie konatan **Danemark, Denmark, Dänemark, Danimarca...**

A.- *Pro manko de internacia komprenebleco la esperantistoj aldonas al la esperanta formo la nacian aŭ pli internacian formon. Ili skribas **Danujo-Danemark.** »*

Cl.- Waringhien prave diras, ke « tia kutimo estas elturniĝo ne inda je nia lingvo, kiu ĝuste pretendas rolon de internacia interkomprenilo. » Kaj li faras interesan proponon memorigante, ke ĝin jam faris Antonio Grabowski en 1920 kaj G. M. Meazzini en 1924. Li proponas « la aplikon al tiuj okazoj de la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko, uzante, kiel internaciajn formojn, ne la nunajn nacilingvajn, sed la jam internaciajn novlatinajn, kiel ekzemple : **Anglatero, Belgio, Britanio, Danemarko, Finmarko, Francio, Germanio, Greco, Helvetio, Hispanio, Hungario, Italio, Polonio, Rusio**, kiujn la poŝtistoj de ĉiuj landoj facile deĉifrus, kaj kiuj konsistigus simple internaciajn duoblaĵojn de la tradiciaj nunaj formoj. »

A.- Waringhien montris en alia eseo, ke « tia kunekzistado de internacia formo, kiel **redakcio**, kun la propre esperantaj, kiel **redaktado** aŭ **redaktejo**, estas unu el la esencaj trajtoj de nia lingvo. »

Cl.- Ni trovas tiun proponon interesa.

A.- Hodiaŭ finiĝas nia ĉerpado el la eseo de Gaston Waringhien *La landnoma demando*. La venontan semajnon ni revenos al tiu temo laŭ instruista vidpunkto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-